Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 13 Decembro 2025



# VENTO

**Veksilologia revuo en esperanto**

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: vento@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

| ENHAVO | Paĝo |
|---|---|
| Pirataj Flagoj | 3 |
| La flago de Mongolio | 12 |
| La samea flago | 14 |
| La fotografaĵo de niaj legantoj | 16 |
| Martiniko | 17 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 20 |
| Ĉu helblua aŭ blua? | |
| Argentino, kiam diskuto ne temas nur pri koloroj | 23 |
| Esperantaj Flag-rubandoj | 27 |
| Veksilologia kuriozaĵo | 29 |
| La angulo de la blazonoj: *Serbio* | 31 |
| Flagoj kaj Poŝtmarkoj: *Dekjariĝo de la Grenlanda flago* | 32 |
| Trovu la eraron! | 33 |
| Kiel kunlabori kun VENTO | 34 |
| Veksilologia Humuro | 35 |

Kunlaboris ĉi-numere: Cristina Bollini, Alejandro Burgos Escalante, kaj José María Rodríguez (red.).

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*



# Pirataj Flagoj

*José M. Rodríguez (Hispanio)*

Ekzistas diversaj teorioj klarigantaj la originon de la pirata flago. Verŝajne, la plej prava el ili devenas de la nomo de la unua standardo uzita de korsaroj: *"red jack"* (ruĝa flago). Korsaroj estis privataj ŝipistoj, rajtigitaj de registaro por rabi dum milito malamikajn komercajn ŝipojn. Tiel, en la jaro 1664 la brita Admiralitato rajtigis korsarojn por sturme ataki francajn kaj hispanajn komercŝipojn, ĉi tiuj korsaroj uzis ruĝan flagon kiel identigilon.

Kiam en la jaro 1714 finiĝis la milito de hispana sukcedo (1701-1714) paca epoko alvenis en Eŭropon kaj ankaŭ en la oceanojn. Do, Britio metis finan punkton al siaj atakoj pere de korsaroj. Tamen, ili sendependiĝis el la brita rajtigo kaj ili, kompreneble, daŭrigis sian profitodonan rabo-agadon. Tiuj korsaroj fariĝis nun piratoj. Unuamomente ili daŭre uzis la ruĝan flagon, kiu jam estis konata kiel *"joli roger",* de la franca *"joli rouge"* (bela ruĝo), sed iom post iom, ili ekuzis alian simbolon, kiu jam estis konata en kelkaj eŭropaj urboj, pro la fakto, ke ĝi flirtis ofte ĉe tombejoj. Temis pri nigra flago kun blanka kranio kaj du ostoj malantaŭ aŭ sub ĝi. Ĉi tiu flago ĉe tombejo esprimis, ke tie regis la morto.



Ruĝa flago kaptita fare de la Brita Mar-armeo en la jaro 1780.

Ĉi tiu nova simbolo estis aldonita al la ruĝa flago, tamen, baldaŭ la nigra fono ĉe la flago anstataŭis la ruĝan koloron. Tiu ruĝa estis ekuzata kun pli kruela signifo, tiel se piratoj flirtigis antaŭ la storma atako ruĝan standardon, tio signifis, ke piratoj respektus nenies vivon.

Do, kiel vidite, la pirata flago, krom simbolo, ankaŭ estis iaspeca "intelekta armilo", celanta timigi la atakotajn ŝipanarojn. Ni troviĝas en la unuaj jaroj de la 18-a jarcento.

La ilustrita literaturo, ĉefe dum la 19-a jarcento kaj ankaŭ la abunda filmaro pri pirataj temoj aperigis piratojn ĉiam sub la sama flago, tiu nigra kun kranio kaj ostoj blankaj, tamen estas necese averti, ke ĉiu pirata kapitano flirtigis sian propran standardon, kvankam elementoj aperantaj sur ili ofte estas tre similaj kaj preskaŭ ĉiam montras saman signifon: morton kaj/aŭ forton.

Ni vidu kelkajn flagojn de famaj pirataj kapitanoj.

• **Edward Seegar** (1685-1720), irlandano. Li estis membro de ŝipanaro sur ŝipo vojaĝanta en Jamajkon. Kiam ili estis atakitaj de piratoj, Edward decidis aliĝi al la pirata anaro. Baldaŭ li sendependiĝis kaj estris novan ŝipon, tiam li estis konata kiel la kapitano Edward England. Laŭdire, li estis la unua pirato kiu uzis la tipan piratan flagon, tio estas nigra fono kun blanka kranio kaj ostoj sub ĝi.



• **Jack Rachham** (1682-1720), anglo. Li estis maato ĉe brita ŝipo, tamen pro problemoj kun la brita guberniestro en Bahamoj, li aliĝis al anaro de pirata ŝipo. Li estris ribelon kontraŭ la franca kapitano de tiu ŝipo, do li fariĝis la nova kapitano. Li estis tre konata pro siaj elegantaj vestoj kaj distingitaj manieroj, ankaŭ pro la fakto ke sur sia ŝipo troviĝis du piratinoj. Laŭdire, Herge baziĝis sur la kapitano Rachham kiam li aperigis piratan kapitanon sur la Tinĉja aventuro *"La Trezoro de Rakamo la Ruĝa"* (1944).

Flago flirtanta sur la ŝipo de la kapitano Rachham estis simila al tipa pirata flago, tamen ostoj estas anstataŭigitaj de du sabroj.







• **Edward Teach** (1680-1718), anglo. Pro sia longa barbo li estis konata kiel "nigrabarbulo". Dum siaj unuaj jaroj kiel ŝipano, li estis korsaro je la servo de la brita reĝo, poste li fariĝis pirato. Li vendis la kaptitajn predojn al nordamerikaj britaj kolonianoj.

Sur la flago de la kapitano "Nigrabarbulo", iomete karnavaleska, aperas nek kranio, nek ostoj, sed kompleta skeleto portanta sablohorloĝon kaj lancon vundantan koron.



• **Henry Every** (1659-1699), anglo. Junaĝe li aliĝis al brita milit-ŝipo, poste li fariĝis bukanero kaj fine sklavisto kaj pirato. Laŭ legendo, li atakis ŝipon de la mogola imperiestro kun grandegaj riĉaĵoj, tio ebligis al li kaj al ceteraj ŝipanaroj retiriĝi el la pirata vivo. Verŝajne li estis la sola pirato kiu vivis sufiĉe por vivi lukse post siaj raboj.

La flago de la kapitano Every estas priskribita en literatura verko komence de la 20-a jarcento, do eble, ĝi ne estis reala, sed literatura elpensaĵo. Temas pri tipa pirata flago, kvankam la kranio aperas profile kaj ornamita de kap-tuko kaj orel-ringo.




• **Emanuel Wynne** (1650-1700), franco. Komence li atakis britajn komerc-ŝipojn en Maniko, inter Anglio kaj Francio, tamen li baldaŭ foriris al la Kariba Maro, tie, sendube, pliaj ŝipoj kun abundaj riĉaĵoj estis pli oftaj. Temas pri la unua pirata kapitano pri kiu ekzistas kredindaj datumoj pri la uzo de la tipa pirata flago. Tio okazis kiam brita milit-ŝipo pruvis kapti lin sensukcese. La brita kapitano detale informis pri la pirata ŝipo kaj pri la flago flirtanta sur ĝi.

Sur la pirata flago de la kapitano Wynne aperas blanka kranio kaj ostoj malantaŭ ĝi. Aperas ankaŭ sablohorloĝo, ofta simbolo de la vivo-paso, do, de baldaŭa morto.



• **Thomas Tew** (1650-1695). Li apartenis al riĉa familio de nordamerikaj britaj kolonianoj. Rajtigita de la brita guberniestro por ataki sklavistajn ŝipojn en afrikaj havenoj, li tuj fariĝis pirato kaj li decidis sturme ataki komercajn ŝipojn, ĉefe en la sudo de la afrika kontinento kaj en la Hinda oceano apud la Araba duoninsulo. Thomas Tew, kune kun la kapitano Misson, kreis komunumon kun la nomo "Libertalia" por piratoj norde de la insulo Madagaskaro, tie libereco estis absoluta. Ĉe tiu komunumo loĝis piratoj kaj eksaj sklavoj liberigitaj okaze de sturmaj atakoj al sklavistaj ŝipoj. Kiel kuriozaĵo, oni devas diri, ke tiu pirata komunumo havis propran flagon, blanka kun teksto signifikanta "Je Dio kaj la Libereco". Ĉar devenantaj el malsimilaj nacioj, enloĝantoj de tiu komunumo parolis piĝinon de la franca, angla, nederlanda, portugala kaj la madagaskara lingvoj.

Sur la flago de la kapitano Tew aperas nek ostoj, nek kranio, nur blanka forta brako ekprenanta cimitaron, tipa glavo orient-devena. Ĉi tio pruvas, ke la maroj tra kie kapitano Tew navigis ĉefe estis tiuj de la Hinda oceano.








• **Stede Bonnet** (1668-1718), barbadano brit-devena. Li estas konata kiel la "ĝentlemana pirato". Lia patro estis riĉa komercisto en la kariba insulo Barbado. Post akraj problemoj kun sia edzino, Stede Bonnet foriris el sia hejmo, li aĉetis velŝipon kaj navigis kiel pirato tra la Kariba maro. Temas pri la unua pirata kapitano kiu ne kundividis la rabitaĵojn kun la ŝipanaro, male, ili ricevis daŭran salajron pro sia laboro kiel piratoj, kaj la kapitano ricevis la tutajn riĉaĵojn kaptitajn. Sendube la kapitano Bonnet, krom pirato, estis lerta komercisto.

Sur la flago de Bonnet aperas blanka kranio kaj nur unu osto, flanke aperas ponardo kaj koro. Temas pri alia versio de la tradicia pirata flago.



• **Christopher Moody** (1694-1722), anglo. Li estis timegata pirato, kiu ĉefe atakis ŝipojn en la Gvinea golfo. Kiel dirite antaŭe, sur pirataj ŝipoj flirtis ĉefe flago kun du koloroj, kaj kun du malsimilaj signifoj. Se temis pri nigra flago, la agado de la atakontaj piratoj estus tre simpla, rabi ĉiujn riĉaĵojn transportintajn sur la ŝipo. Male, se la flago estis ruĝa, tio signifis, ke neniu vivo estus respektita, tiuokaze piratoj murdus ĉiujn ŝipanarojn kaj pasaĝerojn. La flago flirtigita de la kapitano Moody estis ruĝa, li mortigis ĉiujn viktimojn. Sendube pro tio li, kiam kaptita, estis rapide juĝita kaj pendumita.


La flago de la kapitano Moody havis ruĝan fonon kaj aliajn terurajn simbolojn: sablohorloĝon kun flugiloj, signifanta ke vivo-tempo pasis kaj alvenas tuj la morto, reprezentita de apuda brako kun glavo kaj kranio antaŭ ostoj.



- **John Roberts,** konata kiel **Bartholomew Roberts** (1682-1722), kimro. Junaĝe li estis ŝipisto, poste li fariĝis pirato. Li ege respektis la viktimojn de siaj atakoj, li ankaŭ trudis etikan kodon al sia ŝipanaro, kiuj devis respekti virinojn kaj ne trinki alhoholon ĉe la ŝipo.


Sur la ŝipo de kapitano Roberts flirtis flago iom karnavaleska, ene de ĝi aperas pirato kaj skeleto (morto), ambaŭ subtenas sablohorloĝon. Alia flago uzita de li fariĝis tre konata, tiel, informita Roberts, ke oni organizis ŝiparon kun la celo kapti lin en la Kariba maro, sendita de la martinika guberniestro. Roberts hisis flagon, sur ĝi aperas minacanta pirato kiu pied-premas du kraniojn. Sub ili legeblas literoj ABH AMH, kun la signifo -*A Barbadian Head A Martinican Head*- (Barbada Kapo Martinika Kapo). Kompreneble temis pri milit-deklaro kontraŭ la guberniestroj de tiuj insuloj.






- **Edward "Ned" Low** (1690-1724), anglo. Infan-aĝe li jam estis konata kiel habila rabisto en Londono. Kiam sia edzino forpasis, li transiris en Nordamerikon, tie li fariĝis pirato. Li estis ege aktiva. Kapitano Low sturme atakis pli ol cent komercŝipojn. Li ankaŭ estis konata kiel unu el la plej sadistaj kaj sang-avidaj dum siaj atakoj.

Lia flago tion pruvas. Sur nigra fono aperas simpla skeleto, tamen ruĝkolora, kun la signifo de la ruĝa koloro kiam ĝi aperas sur pirataj flagoj.








- **John Quelch** (1666-1704), anglo. Lia pirata kariero apenaŭ daŭris unu jaron, tamen li estas memorata pro la fakto, ke li estis la unua pirato kiu, laŭdire, kaŝis sian trezoron ene de senhoma insulo. Li ankaŭ estis ĉefrolulo de pridebatita jura kazo tiutempe. Kapitano Quelch agadis ankaŭ kiel korsaro, rajtigita de la brita Admiralto por ataki hispanajn kaj francajn komercŝipojn. Tuj post ataki portugalan galionon venantan el Brazilo, li estis arestita kaj tuj juĝita, sub la akuzo sturme ataki ŝipon de regnolando aliancita kun Britio. Li mortis pendumita. Antaŭ ol esti kaptita oni diras, ke li kaŝis sian trezoron en la insulo Star, fronte al marbordo de Nov-Hampŝiro. En la 19-a jarcento oni trovis kelkajn orajn monerojn kaŝitajn en tiu insulo.

Tipaj elementoj aperas sur la flago de la kapitano Quelch, kiel lanco, koro kaj sablohorloĝo, kvankam anstataŭ skeleto sur la flago aperas vira korpo.





La montro de la pirata flago jam estis efika armilo por timigi baldaŭajn viktimojn.

Piratoj ne nur agadis en la Kariba maro aŭ laŭlonge de la afrika kontinento, tiel, ankaŭ en la Mediteranea maro troviĝis korsaroj kaj piratoj. Ili estis konataj kiel "berbereskoj". Ili operacis en ĉi tiu maro de la 11-a ĝis la komenco de la 19-a jarcento. Ili havis kiel militbazojn la urbojn Tunizo, Tripolo kaj Alĝero.

Berbereskoj sturme atakis milojn da ŝipoj, ĉefe en la maroj ĉirkaŭantaj Hispanion, Italion kaj Malton. Krom ŝipoj ili atakis ankaŭ vilaĝojn laŭlonge de la marbordo, kun la celo forrabi homojn, prefere virinojn, kiuj poste estis venditaj en islamaj landoj kiel sklavoj. Laŭ kalkuloj dum tiuj jarcentoj pli ol unu miliono da homoj estis forrabitaj de berbereskoj. Kompreneble homoj en marbordoj provis defendi sin de tiuj atakoj, tiel ankoraŭ videblas en la mediteranea hispana marbordo kaj ankaŭ en insuloj kiel Korsiko, turojn starigitajn kun la celo averti pri la alveno de berbereskaj piratoj.

Ofte, ĉi tiuj berbereskaj piratoj reale estis eksaj okcidentaj korsaroj kiuj islamiĝis, ekzemple la angla Jack Eard, kiu renomiĝis Yusuf Rais. Pri la flagoj flirtantaj sur berbereskaj ŝipoj, supozeble ĉiu kapitano havus sian propran standardon. Nur ekzistas priskribo de unu el ili, pri kiu oni diras ke sub verda fono videblis blanka kranio. Do, tute simila al okcidentaj piratoj, escepte la verda fona koloro.




Kvankam sendube, la plej fama islama pirato estis la turka Hizir Hayretti Pasha, pli konata kiel Barbarrosa (ĉirkaŭ 1478 - 1546). Li estis turka admiralo je la servo de la sultano Sulejmano la 1-a. Li ankaŭ estis korsaro tra la Mediteranea maro. Kune kun sia frato Aruj kaj sub la protekto de la otomana imperio, li kreis ligon de piratoj, kies ĉefa celo estis ataki ŝipojn de kristanaj regnolandoj en la Mediteraneo. Liaj agadoj kiel maroficiro kaj korsaro metis la bazojn de la pova mar-influo de la Otomana Imperio en ĉi tiu maro, ĝis la venko de la kristana ŝiparo en Lepanto en la jaro 1571.



*VENTO* veksilologia revuo en esperanto

La flago flirtigita de Barbarrosa estas konata, ĉefe pro la fakto ke li estis elstara maroficiro de la otomana imperio kaj eĉ nuntempe lia tombo estas monumenta loko en Istambulo.



La flago de Barbarrosa havas verdan fonon, tiu estas la koloro de islamo. Sur ĝi aperas surao de la Korano kun la jena signifo: "*Venko de Alaho kaj elstara konkero: bonajn novaĵojn al kredantoj, ho Mohamedo"*. Sube, ene de kvar krescentoj aperas la nomoj de la kvar kalifoj regantaj post Mohamado. Meze aperas du klingoj de la glabo Dhu'l-Fiqar, armilo kiu unue apartenis al Mohamado kaj poste al Ali. Apud la tenilo aperas malgranda mano. Sube, inter tiuj du klingoj, videblas ses-pinta stelo, kiu ne rilatas al juda popolo, male, ĝi estis kutima islama simbolo mezepoke.

Ankaŭ ĉe la aziaj maroj agadis piratoj. Ĉirkaŭ Borneo, Malajzio, Filipinoj kaj laŭlonge de la ĉina marbordo ofte troviĝis piratoj, foje maskitaj per simplaj fiŝ-kaptistoj. Inter ili la reĝino de la piratoj, la ĉina Zeng Shi (1775-1844). Laŭdire, ŝi estris enorman ŝiparon, pli ol 1000 diverstipaj akvoveturiloj kun 80.000 homoj je ŝia servo. Por identigi sin, ili flirtigis la flagon laŭdante la diinon T'ien Hou, kiu kvietigis tempestojn kaj protektis fiŝ-kaptistojn.



# La Flago de Mongolio

*Cristina Bollini (Italio)*

La nuna flago de Mongolio devenas de tiu uzita en la jaro 1940 kaj simbolas la naciismon kaj la budhismon.

La mongolia konstitucio de la jaro 1992 (artikolo 12, paragrafo 5) fiksas:

*"Mongolia flago estas kombinaĵo de ruĝo, lazuro kaj ruĝo. La centra parto de la flago, unu triono granda, estas lazura por la eterna cielo ("tengré" en la mongola lingvo) kaj ĝiaj du flankoj estas ruĝaj por simboli sunleviĝon. Centre de la ruĝa fono sur la orienta flanko de la flago estos poziciigita ora "soyombo". La larĝo kaj longo de la flago sekvas la proporcion 1:2."*

Ĉi tiu flago estas tre simila al tiu adoptita en la jaro 1945, kiu havis unu kvinpintan stelon super la sojombo.

La du ruĝaj bendoj origine reprezentis la komunismon, sed freŝdata interpreto volas ĝin kiel simbolojn de progreso kaj prospero, kun la blua bendo reprezentanta la patriotismon de la mongolaj popoloj.

En la jaro 2011 la centra bendo estis modifita, anstataŭigante lazuron per bluo.



Flago ekde 1945 ĝis 1992 sur kiu oni povas vidi la kvinpintan stelon, kiu simbolas komunismon.

Bluo estas la tradicia koloro de popoloj de Mongolio, kaj simbolas la "tengré" (la ĉielon), kiu estas klara dum la plej multo de la monatoj, kaj estas konsiderata de la nomadoj, la hejmo de dioj kaj spiritoj de la naturo, al kiuj oni prezentas oferojn.



*VENTO* veksilologia revuo en esperanto



Flago ekde 1992 ĝis 2011



Nuna flago

La simbolo konsistas el multaj partoj, vertikale aranĝitaj:



- Fajro: reprezentas eternan kreskon, riĉecon kaj sukceson. Ĝi havas tri langojn, kiuj reprezentas pasintencon, numtempon kaj estontecon. Flamo havas formon de tridento de Ganeŝo kaj estas simbolo de la budhana fido.
- Suno kaj luno simbolas eternecon de Mongolio, ĉar ili estas la plej grandaj ĉielaj astroj kaj la ĉielo estas konsiderata kiel la domo de dioj.
- Trianguloj: la supra reprezentas la sagojn kontraŭ internaj malamikoj, la malsupra simbolas sagojn kontraŭ eksteraj malamikoj.
- Horizontalaj rektanguloj estas simboloj de la internaj limoj de Mongolio kaj de honesteco kaj justeco de la sociaj klasoj de mongola popolo.



En la ŝtata blazono lotusa floro (simbolo de pureco) estas enkadrigita de la "Tumen Nasan" de la eterneco sur blua fono, simbolo de la ĉielo. La ĉevalo, sur kiu oni vidas la "Soynobon", kiu simbolas la sendependecon, dum la tri juvelŝtonoj ("Chadmani") rememorigas pasintecon, nuntempon kaj estontecon. La rado de la destino kaj verda pejzaĝo (simbolo de la "Patrina Tero") kompletigas la skemon.

# La Samea Flago

*José María Rodríguez (Hispanio)*

La samea poplo estas la indiĝena loĝantaro de la nordaj regionoj de Finnlando, Norvegio, Svedio kaj la Kola duoninsulo en Rusio. Oni kalkulas, ke ekzistas inter 50.000 kaj 100.000 sameoj, el tiuj ĉirkaŭ duono loĝas en Norvegio.

El la etna vidpunkto, sameoj estas tre unika grupo, tre malproksima de ĉiuj najbaraj popoloj. Rilate sian kulturon ili parolas sameajn lingvojn, ĉefe tri variantojn, similajn al la finna lingvo. Ĉiuj kulturaj esprimoj estas ege influitaj de ĉasado, boac-bredado kaj fiŝkaptado. Ĝis la mezo de la 20-a jarcento sameoj estis nomadoj, ili loĝis en tendoj similaj al nordamerikaj aborigenaj vigvamoj. Nuntempe, ĉio ŝanĝiĝis, do, preskaŭ ĉiuj sameoj loĝas en vilaĝoj kaj urboj, kvankam 10% el ili ankoraŭ estas nomadoj kaj sin dediĉas al bredado de boacoj.

El la politika vidpunkto, en la jaro 1956 oni starigis la Nordan Konsilion de Laponoj, nuntempe la vorto "lapono" estas foje konsiderata malrespektema kaj evitinda. Do, hodiaŭ ĝi nomiĝas Norda Konsilio de Sameoj, kiu celas unuigi sameojn de Finnlando, Norvegio kaj Svedio, poste aliĝis ankaŭ sameoj de la rusa Kola duoninsulo. En la urbo Karasjok (Norvegio) troviĝas la Samea Parlamento, kreita en la jaro 1989 kun la celo protekti la kulturajn, lingvajn kaj leĝajn rajtojn de ĉi tiu popolo.



Samea Flago





En la jaro 1986, ĉe la Norda Konsilio de Sameoj, oni proponis flagon kun la celo reprezenti la samean popolon. La simbolo fine estis adoptita la 15-an de aŭgusto de 1992.

La dezajnisto de la samea flago estis la norvega artisto Astrid Båhl. Okulfrape, la flago ne montras la tradician skandinavan krucon, tiel elstariĝas propra kaj malsimila identeco.



Astrid Båhl, aŭtoro de la samea flago

La flago inspiriĝas el muzik-instrumento ludita de antikvaj sameaj ŝamanoj, ankaŭ de "kolten", bunta tradicia vestaĵo. Sur la flago, meze, aperas duon-cirklo ruĝa, simbolo de suno, apude alia duon-cirklo blua, simbolanta la lunon. La tuta cirklo reprezentas la spiritecon de la samea popolo. Videblas ankaŭ vertikalaj strioj, tiu ruĝa reprezentas la fajron, varmon kaj amon. La verda strio memorigas la naturon, tiu flava reprezentas la sunon kaj fine la blua strio estas la simbolo de la akvo. Ĉi ĉiuj temoj aperas ofte en la popolaj rakontoj de la Samea popolo.



Samea flago flirtas antaŭ la Parlamento de la Samea Popolo en Karasjok (Norvegio)

# La fotografaĵo de niaj legantoj



Flago de Orienta Timoro en ties ambasadejo en Lisbono (Portugalio)
Majo, 2023
Fotis: C. Pérez.

*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*

*NI ATENDAS VIAJN FOTOGRAFAĴOJN !*





# Martiniko

✍ *Cristina Bollini (Italio)*

Martiniko (Antila insulo) estas franca transmara departemento en la Kariba Maro. Malkovrita fare de Kristoforo Kolombo en la jaro 1502, ĝi estis loĝata de la karibaj indianoj (Aravakoj), kiuj nomis ĝin "Madinina" (“insulo de la floroj”), klara rilato al flaŭro kiu kovras la tutan insulon (tropikaj plantoj, floroj, fruktarboj igas Martinikon vera ĝardeno).

En la jaro 1635 la insulo iĝis franca kolonio, kaj la alvenigitaj sklavoj estis devigitaj labori en la sukerkanaj plantejoj. La insulo restis preskaŭ ĉiam sub franca protekto, krom mallonga periodo en la jaro 1762 kiam ĝi transiris al la angloj. Ekde la jaro 1982 Martiniko rajtas elekti la “Regionan Konsilion de Martiniko”, kiu havas plenajn povojn je loka nivelo, kaj fariĝis “Asembleo de Martiniko” en la jaro 2016.

La 2-an de Februaro 2023 la “Asembleo de Martiniko” adoptis oficialan flagon, kiu povos esti uzata dum la internaciaj eventoj (ekz. Olimpiaj Ludoj, kongresoj, ktp.) sed kiu devos ĉiam esti akompanata sur publikaj konstruaĵoj de la franca trikoloro kaj de la eŭropunia flago.



Oficiala flago depost 02/02/2023

La nova flago konsistas el du horizontalaj bendoj (verda supre kaj nigra sube), kiuj estas kunigataj per ruĝa triangulo lokigata apud la flagostango. Oni opinias ke ĉi tiuj koloroj estis uzataj ekde la mezo de la 17-a jarcento fare de la ribelantaj sklavoj kaj, nun, ili simbolas la fekundecon de la grundo, laboron kaj

fidon je la estonteco (verdo), la sangon elverŝitan por akiri sendependecon (ruĝo) kaj la originon de la loĝantaro (nigro).

Ekde la jaro 1766 Martiniko havis alian oficialan flagon, konata kiel “flago de serpentoj”, kiu estis uzita origine kiel flago sur ŝipoj.La flago konsistis el blanka kruco kiu estas dividita en kvar egalaj partoj bluan fonon; sur ĉiu kvarono aperas blanka serpento.

Ĉi tiu flago estis kritikita ĉar ĝi memorigas kolonian periodon; do, oni provis atribui al serpentoj signifon rilatan al la loka faŭno, identigante ilin kiel la “Martinikan vipuron” aŭ “feran lancon”, loka specio de serpento (*Bothrops atrox* laŭ scienca nomo de Linnaeus).



1766 - 2019

En la jaro 2019 ĉi tiu flago estis anstataŭigita de la “identeca flago”, kojnigita blua-verda okoble drapo, kun blankaj strioj kaj, centre, blanka disko sur kiu oni povas vidi lokan konkon, la “gigantan konkonon” (*Strombus pugilis* - Linnaeus), kiu simbolas la biodiversecon de Martiniko.



2019 - 2021






Sur la rando de la flago aperas 34 etaj steloj simbolantaj la municipojn de la insulo kaj 8 arkoj, kiuj memorigas la parolatajn lingvojn, tra la fluo de la jarcentoj, de loĝantaro de Martiniko. Bluo simbolas la Kariban Maron kaj la Atlantikan Oceanon, verdo simbolas la arbarojn de la lando.

Atentu…. sur ĉi tiu insuleto oni parolas (aŭ parolis) francan, kreolan, anglan, hispanan, portugalan, italan, ĉinan kaj araban lingvojn…. Kiom da komunikadaj problemoj estus solvitaj se oni parolus ankaŭ Esperanton!

Sed ni revenu al ĉi tiu flago, kiu estis forlasita en la jaro 2021 per leĝfara preteksto. En la jaro 2023 popola referendumo deklaris kiel novan flagon, drapon ruĝan kaj nigran, diagonale divita per verda linio, sur kiu oni vidas kolibron Sed post multaj travivaĵo, ĉi tiu flago estis retirita kaj nun la oficiala flago estas la verda-nigra horizontala dukolora drapo kun ruĝa triangulo.



Flago de kolibro (forigita en 2023)






Cristina Bollini, aktiva kunlaboranto en nia revuo, estas la aŭtoro de nova libro en la internacia lingvo Esperanto. Temas pri ***"Heraldiko por komencantoj"***.

La libro troveblas ĉe Amazon.

ISBN: 979-1224009344

# Lastaj Informoj pri Flagoj



## Diplomatia problemo inter Danio kaj Usono pro la demeto de flagetoj

Laboristo de la usona ambasado en Kopenhago (Danio) demetis 44 danajn flagetojn starigitajn ene de florpotoj, fronte al la ambasadejo. Ĉi tiuj flagetoj memorigas kaj omaĝas la 44 danajn soldatojn mortintajn dum la milito en Afganio. Tiam, armeoj de NATO-ŝtatoj, inter ili Danio, sendis siajn soldatojn kiel apogon al Usono. Sendube, la demeto de ĉi tiuj simboloj ŝuldiĝas al la nuntempa debato pri la estonteco de Grenlando post la diskonigo de la pretendoj de la usona prezidanto Trump akiri, iamaniere, la insulon kiu troviĝas sub dana suvereneco.



Televid-programo montris ĝuste la momenton kiam funkciulo de la usona ambasadejo en Kopenhago demetis la flagetojn.

La dana asocio de milit-veteranoj kondamnis ĉi tiun agadon, konsideratan kiel ne-necesan kaj ne-senteman, kvankam ties prezidanto, S-ro Carsten Rasmussen, petis respondon serenan kaj respekteman. Post la publikigo de la informo, akompanita de televidaj bildoj kie estas eble vidi la momenton kiam usona funkciulo demetas la flagetojn, reprezentanto de la ambasado respondis, ke tiu agado realiĝis sen-malice, kaj ke ili tute ne konis la signifon de tiuj 44 flagetoj, kiuj, laŭ sciigo de la ambasado, estos denove starigitaj tiuloke.



*VENTO* veksilologia revuo en esperanto

## Laŭ Eŭropa Unio, ne estas devige flirtigi nacian flagon de la ŝtato kie troviĝas ŝipo

La Eŭropa Komisiono ekigis proceduron kontraŭ Hispanio, Francio kaj Italio, pro la fakto, ke ĉi tiuj ŝtatoj volas puni komerc-ŝipojn, ĉefe tren-ŝipojn, kiuj troviĝas en havenoj de tiuj ŝtatoj, tamen ili ne flirtigas iliajn naciajn flagojn. Ĉi tiuj eŭrop-uniaj landoj devigas al tiuj ŝipoj montri siajn naciajn flagojn, ĉar ili konsideras, ke temas pri nepra kondiĉo por efektivigi naciajn leĝarojn, inter aliaj aferoj, tiuj pri kontrolado de labor-kondiĉoj de la ŝipanaro.



Tamen, la Eŭropa Komisiono sciigis al Hispanio, Francio kaj Italio, ke ĉiu ŝtato rajtas apliki sian nacian leĝaron al ĉiuj komerc-ŝipoj troviĝantaj en siaj havenoj, sendepende la nacieco de tiu ŝipo, do, ankaŭ de la flirtanta flago. Se tiel, la Komisiono konsideras, ke oni ne rajtas devigi ilin montri unu aŭ alian flagon.

## La urbo Salt Lake City oficialigis novajn flagojn

La registaro de la usona ŝtato Utaho, kune kun kelkaj aliaj, aprobis dum la lastaj jaroj leĝojn, kiuj malpermesas flirtigi ĉe publikaj konstruaĵoj ne-oficialajn flagojn. Do, estas permesite montri nur flagojn de Usono aŭ de aliaj ŝtatoj, ankaŭ tiujn de usonaj ŝtatoj, armeajn standardojn kaj flagojn de kulturaj institucioj. Mon-puno por flirtigo de aliaj flagoj ĉe oficialaj lokoj estas 500 dolaroj.

La urbestro de Salt Lake City, ĉefurbo de la ŝtato Utaho, trovis la manieron eviti tiun malpermeson, tiel, oni deklaris kiel oficialajn flagojn ĉe la urbo tiujn flagojn kiuj reprezentas la GLAT-movadon, la transseksecon kaj la finon de la sklavismo. Al ĉi tiuj jam ekzistantaj flagoj oni aldonis la simbolon de la urbo: lilio-floron. Do, ĉi tiuj flagoj, kune kun tiuj reprezentantaj la urbon mem kaj la ŝtaton, povos flirti ĉe publikaj lokoj en la urbo Salt Lake City.



S-ino Erin Mendenhall, urbestro de Salt Lake City, dum de la prezento de novaj oficialaj flagoj de la urbo.









# Ĉu helblua aŭ blua?

## Argentinio, kiam diskuto ne temas nur pri koloroj.

*José María Rodríguez*

La 27-an de februaro 1812, dum luktado por sendependiĝo de la Unuiĝintaj Provincoj de Plata-rivero, generalo Manuel Belgrano troviĝis en la urbo Rosario. Kun la celo instigi la soldatojn, li decidis flirtigi flagon, kiu, laŭ li mem skribis, baziĝis sur jam ekzistanta kokardo, tiu uzita de patriotoj kiuj deziris la sendependiĝon de tiuj provincoj. Estas necese diri, ke la koloroj uzitaj sur tiuj kokardoj verdire estis simbolo de la borbona dinastio, abolita en Hispanio kelkajn jarojn antaŭe post la napoleona invado de la Ibera Duoninsulo. Tiutempe en la nuntema Argentinio, pli specife en Bonaero, patriotoj ornamis sin pere de helblua kaj blanka kokardo, fronte al ruĝa kokardo, uzita de tiuj kiuj apogis la hispanan regnolandon.



Kokardoj uzitaj de la Plata-riveraj patriotoj


Belgrano priskribis la novan flagon, kiel tiu havanta du kolorojn, blankajnkaj ĉielbluan. Supozeble tiam, kaj tion ankaŭ pruvas kelkaj flagoj tiutempaj ankoraŭ konservitaj, la unua argentina flago havis nur du striojn, supren blanka kaj suben blua.

Rilate la bluan koloron, Belgrano tutklare parolis pri "ĉiela bluo", tio estas, la blua koloro de la ĉielo. Sed, eblas demando: kia ĉielo? Kompreneble blua koloro ne tute egalas je ĉiuj horoj. Tiel, ne esta simila la blua koloroj aperantaj komence aŭ fine de la tago, al tiu videbla, ekzemple, tagmeze. Certe, ekzistas en la hispana lingvo koloro nomita "*azul celeste*" aŭ simple "*celeste*", kies signifo estas helbluo.

La afero pri la tono de la blua koloro ĉe flago povus esti komprenata kiel tute ne grava, tamen estas necese antaŭdiri, ke post la sendependiĝo de la tiamaj Unuiĝintaj Provincoj de Plata-rivero, du politikaj flankoj kontraŭstariĝis.

Unuflanke, tiuj kiuj deziris fondi unuigitan kaj liberalan respublikon, ili flirtigis blankan kaj helbluan flagon. Aliflanke, tiuj kiuj luktis favore al federala respubliko, kies flago estis blanka kaj blua, ne helblua.

Tiuj, kiuj luktis favore al la federalaj idealoj aniĝis en la Unuiĝo de la Liberaj Popoloj, sub la gvidado de José Artigas, poste heroo de la urugvaja sendependiĝo. Ĉi tiu frakcio flirtigis flagon dezajnitan de Artigas mem.





Flagoj flirtigitaj de la federala frakcio (aŭtoro: José Artigas).
1814 1814-1820

Tiuj, kiuj defendis novan respublikon sub centrala kaj unuigita nacia registaro ne uzis specife propran flagon, tiel ili montris la simbolon ekuzitan dum la lukto favore la sendependiĝon, aperis ankaŭ flago por la ŝiparo. Ambaŭ uzis helbluan koloron.



Flago ekuzita dum la sendependiĝaj luktoj



Flago de la ŝiparo





Do, lukti aŭ montri unu aŭ alian flagon signifis celi malsimilan politikan vojon. Bedaŭrinde tio signifis ankaŭ konstantajn militojn. Post sennombraj bataloj, dum kiuj luktis ne nur ideoj pri la strukturo de la ŝtato, ĉu federala ĉu centrisma, sed ankaŭ personaj kvereloj inter provincaj militestroj, finfine en la jaro 1832 federalaj guberniestroj regis ĉiujn argentinajn provincojn.

Tiam, de antaŭ pli ol jardeko, José Artigas jam ne partoprenis en tiuj luktoj, do la flagoj de li pripensitaj kaj proponitaj ne gvidis la federalajn trupojn.

Flagoj de la venkanta federala frakcio



1831 - 1836



1836 - 1852



Depost 1852

Videblas, ke la blua koloro daŭre estas ne-helblua. Krome aldoniĝis novaj elementoj, kiel suno, ĉu flava ĉu ruĝa, kaj kvar frigiaj ĉapoj, simbolo de libereco.

En la jaro 1853 okazis en la urbo Santa Fe konstitucifara asembleo, Tiam oni aprobis la nun ekzistantan argentinan konstitucion, kiu celis finigi la ciklon de enlandaj militoj kaj meti la bazojn de la nacia organizado. Neniu mencio aperas pri la koloroj de la flago de la respubliko en tiu supera leĝo.

Tamen, dum la debatoj cele la redaktadon de la nova konstitucio oni decidis, ke definitive la flago de Argentino, tiam Argentina Kunfederacio, estus formita de tri similaj strioj: helblua, blanka kaj helblua, kaj meze de la blanka centra strio videblus suno. Do, definitive la originala helblua koloro de la lukto por la sendependiĝo estis denove uzata.



En la jaro 1938, leĝo denove proklamis la bluan koloron de la flago, tamen kun la indiko, ke "temas pri la ĉiela koloro kiam ektagiĝas". Pro la fakto, ke ne temas pri konkreta koloro, leĝo de la jaro 1944 fiksis, ke la koloroj de la argentina flago estas, jam definitive, helblua kaj blanka.





*VENTO* veksilologia revuo en esperanto


# Esperantaj Flag-rubandoj


Flag-rubandoj estas longaj flagoj, pli larĝaj apud stango ol ĉe flirtparto. Ili havas kelkajn formojn, kiel triangulan aŭ flam-forman, dupintan flam-forman, tripintan, senpintan, dupintan kun hirundan voston, rondforman ktp. Sciate, ke flagoj difektiĝas pro forta vento aŭ pluvo, same vidado de nuda stango, tio estas sen flago flirtanta, estas malfeliĉa vidaĵo, do, taŭga solvo estas pendumi flag-rubandon, kiu pro sia malgrandeco kaj longeco ne eluziĝas tiom rapide.

En Esperantio neniam videblas ĉi tiuj flag-rubandoj dum kongresoj aŭ ĉe sidejoj, tamen estus tute necese difini kia ili devus esti, se iufoje oni decidas flirtigi ĉi tiujn specialajn flagojn dum E-renkontiĝoj.

Jen proponoj por esperantaj flag-rubandoj:


• Triangula aŭ flam-forma:







• Dupinta flam-forma:







- Tripinta flam-forma:





- Tripinta flam-forma:




- Dupinta kun hirunda vosto:




- Rondforma:








# Veksilologia kuriozaĵo


## *Flago redonita post 80 jaroj*

En la jaro 1914 Pierre de Coubertin, iniciánto de la modernaj Olimpiaj Ludoj, pripensis flagon por reprezenti ĉi tiun sportan movadon. Li dezajnis la simbolon. Sur ĝi aperas kvin interkroĉitaj ringoj en la koloroj blua, flava, nigra, verda kaj ruĝa. La sesa uzita koloro estas la blanka por la fono. Laŭ vortoj de Coubertin mem:

*"La ringoj reprezentas la kvin kontinentojn, kiuj estas unuigitaj en la olimpia movado; la ses koloroj korespondas al tiuj de ĉiuj naciaj flagoj de la hodiaŭa mondo."*

Por teksi tiun unuan flagon oni elektis irlandan linon, tiame la plej altkvalita kaj multekosta.

Coubertin elektis la olimpiajn ludojn de la jaro 1916 por unuafoje oficiale hisi la flagon, tiuj ludoj devus okazi en Berlino (Germanio). Tamen, la eksplodo de la unua mond-milito en la jaro 1914 malebligis la okazigadon de tiuj ludoj, do, ankaŭ de la oficiala prezento de la flago. La unua hisado finfine okazis dum oficiala malfermo de la Olimpiaj Ludoj de Antverpeno (Belgio) en la jaro 1920. Tamen, kiam okazis la ceremonia fermo... la flago ne flirtis ĉe la stango, iu forrabis ĝin.



La olimpia flago unuafoje hisita okaze de la inaŭguro de la Ludoj en la jaro 1920 en Antverpeno (Belgio)

En la jaro 1997, preskaŭ 80 jaroj post la okazigo de tiuj Olimpiaj Ludoj en Antverpeno, okazis bankedo de la Olimpia Usona Komitato, al kiu estis invitata Harry Prieste. Li estis 101-jaraĝa kaj en tiu momento li estis la plej maljuna usona sportisto medalita en la Olimpiaj Ludoj, ĝuste en tiuj okazintaj en Antverpeno en la jaro 1920.

Dum la bankedo li estis intervjuata de ĵurnalisto, kiu interesiĝis pri la afero de la rabita flago. Do, la ĵurnalisto lin demandis:

*- Ĉu vi scias, ke la originala olimpia flago estis prezentita dum tiuj ludoj en Antverpeno kaj ke tiu standardo estis tiam forrabita*:

*- Ha! Mi ne sciis, ke ĝuste tiu flago estis la originala. Do, ĉu vi scias? Ĝi estas ĉe mi!* - respondis Harry Prieste trankvile. Kaj li daŭrigis:

*- Mi vidis flagon flirtantan kaj mi diris al mi mem... tiun flagon mi devas preni. Alia sportisto diris "vi ne estos kapabla". Do, ni vetis kelkajn dolarojn. Nu, mi grimpis sur la stangon, mi prenis la flagon kaj mi poste kuris kiel eble plej rapide, ĉar policisto vidis ĉion kaj li volis haltigi min, tamen mi estis sportisto, do mi kuris pli ol la policisto. Poste, tiu flago venis en mian hejmon ene de mia valizo.*

Kompreneble, post ĉi tiu konversacio Harry Prieste decidis redoni ĝin. Tio okazis dum la sesio de la Internacia Olimpia Komitato en la jaro 2000. La tiama prezidanto ricevis enmane la flagon, kiam Harry estis 103-jaraĝa. Li ankoraŭ vivis du jarojn pli.



S-ro Harry Prieste dum la redono de la originala olimpia flago
al Internacia Olimpia Komitato en la jaro 2000





# La angulo de la blazonoj
## *Serbio*

Kiam en la jaro 2006 Serbio fariĝis propra ŝtato, post la disiĝo de la tiama "Serbio kaj Montenegro", tiu nova lando konsistigis sin kiel respublikon, malgraŭ la fakto ke sur la nacia flago aperas reĝa blazono.

Sur tiu blazono aperas blanka kruco en la formo de greka kruco, kun kvar samlongaj brakoj sur ruĝa fono. Ĝi estas konata kiel "serba kruco", kvankam ĉi tiu simbolo jam aperis sur helenaj kaj bizancaj artaĵoj.





En ĉiu el la kvar ruĝaj partoj dividitaj per la kruco aperas simbolo nomita "fajroŝtalo", kies du dekstraj ekzempleroj aspektas simile al la cirilia litero "C". Laŭ intepretoj, kaj se konsideri ke temas pri kvar literoj C, la signifo estus "Само слога Србина спасава", tradukita kiel la serba moto "nur unueco savas la serbojn".

La serba kruco ornamas blazonon, kiu protektas la bruston de dukapa ablo, je kies supro videblas ora krono. La lili-floroj sub la aglo aperas sur la blazono depost la jaro 1888, kiel simbolo de la historia reĝa dinastio de Kotromanić.



# Flagoj kaj poŝtmarkoj




## *Dekjariĝo de la Grenlanda Flago*

En la jaro 1938 la danlanda ĉefministro leĝe permesis la starigon de propra poŝta servo en Grenlando. Tuj poste, ĉi tiu teritorio estis admisiita ene de la Universala Poŝta Unio, do, Grenlando estis rajtigita eldoni siajn proprajn poŝtmarkojn.

Ene de la filatelia mondo oni elstaras la belecon de la grenlandajn poŝtmarkoj, kiuj kutime estas dediĉitaj al la naturo kaj kulturo de la teritorio. En la jaro 1995 oni eldonis poŝtmarkon dediĉitan al dekjariĝo de la oficiala adopto de la grenlanda flago, *Efalarsorput*.

Oni eldonis 164.320 ekzemplerojn, la dezajnisto estis Thue Christiansen, kaj sur ĝi aperas du infanoj flirtigante grenlandan flagon. Serio de kvar poŝtmarkoj unuigitaj kaj samvaloraj estis ankaŭ eldonita.







Poŝtmarko dediĉita al dekjariĝo de la Grenlanda flago. 1995








## *Trovu la eraron!*





Ministroj pri Eksterlandaj Aferoj de Ĉilio kaj Portugalio ĝuste antaŭ siaj naciaj flagoj kaj la eŭrop-unia standardo. Videblas ke la ĉilia flago estas inverse lokigita

En la jaro 2023 renkontiĝis en la portugala ambasadejo en Braziljo la ministroj pri eksterlandaj aferoj de Ĉilio, S-ino Antonia Urrejola, kaj de Portugalio, S-ro João Gomes Cravinho. Kutimaj aferoj estis pritraktitaj, do, bonaj rilatoj kaj kunlaborado inter ambaŭ ŝtatoj ktp.

Tamen la plej okulfrapa afero post la renkontiĝo aperis sur la oficiala fotografaĵo, Tie estas eble vidi la ĉilian flagon inverse lokitan. La ministerio pri eksterlandaj aferoj de Portugalio pardonpetis. Laŭ ili asertis, ĉio estis provokita de eraro de funkciulo de la portugala ambasadejo.



## Kiel kunlabori kun **VENTO**

- Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

- Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.


- Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

- La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

- Memoru, ke nia ret-adreso estas: vento@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:

Revuo VENTO
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

La adreso kaj la TTT-paĝo estis afable havigita de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. www.esperanto.ac




Ĉiuj numeroj ĝis nun publikigitaj de la revuo legeblas libere ĉe:
www.esperanto.ac/vento






# Veksilologia Humuro



*Jes, kara. Mi decidis fini mian am-rilaton kun li.*

*Ĉu vere? Kial?*



*Nu, li estas komunisto. Tio por mi estas "ruĝa flago" en nia rilato.*

*Ha! Kompreneble, jes!*

**La venonta numero de la revuo VENTO aperos fine de la monato aprilo '26.**

**Se Vi deziras kunlabori ne hezitu kontakti kun ni:**

**vento@esperanto.ac**


XIV:A UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO
EN HELSINKI - HELSINGFORS
FINNLANDO 6-12 AŬGUSTO 1922